

Gerda Illerhues,
Abenddämmern

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Gerda Illerhues,
Vespera krepusko

tradukita de Manfred Retzlaff

Vespera krepusko –
Sinkas la sun’.
Ombrojn ludantajn
vidas mi nun.

Vespera krepusko –
Susuras la vent’,
fora ekrido
en la silent’.

Vespera krepusko –
Aŭdiĝis jen kri’,
turmenta hastado,
jam pasis nun ĝi.

Vespera krepusko –
Eklumas la klar’,³
dum noktoproksimo,
de la stelar’.

...

³ aŭ:
Eklumas en klar’,
dum nokt’ proksimiĝas,
jen la stelar’.

Vespera krepusko –
 Tempo de l' ben',
 estonto tre foras
 kaj la maten'.

Vespera krepusko –
 ripoz' ĉie ĉi,⁴
 paca trankvilo
 elmane de Di'.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas GERDA ILLERHUES (*1930).*

Arg-771-1545 (2013-01-16 18:15:06)

*Tiu ĉi poemo aperis en la jaro 2001 en la gazeto "Landwirtschaftliches Wochenblatt für Westfalen-Lippe".
 La verkinto, s-ino Gerda Illerhues, loĝis en Lehbergstr. 50, D-46282 Dorsten, Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo "Abenddämmern" de GERDA ILLERHUES (*1930) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2001-05-29.*

MR-351-1b / Arg-771-1548 (2013-01-16 18:18:18)

⁴aŭ senrime:
 ripozas la land',
 paca trankvilo
 el Dia man'.